


ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Bimonthly organ of the Esperanto League for North America, Inc., Box 1129, El Cerrito, CA 94530 USA.
Telephone (415) 653-0998. Editor: Catherine L. Schulze. Graphics: Wm. R. Harmon. Includes promotional
section in English and informational section in Esperanto for ELNA members. ISSN 0030-5065. Vol. 14, No. 6.
November-December 1978



Lucerne, Switzerland

San Francisco State University offers

A SYMPOSIUM WITH WILLIAM AULD
Locarno, Switzerland, July 18-28, 1979

PRECONVENTION TOUR to the Italian, German and French
regions of Switzerland, July 19-27, 1979

CONVENTION WEEK IN LUCERNE — July 28 - August 4

POSTCONVENTION TOUR TO SPAIN AND PORTUGAL
August 5-12, 1979

NOTE: Detailed travel, hotel and excursion arrangements and
costs are described in the special mailing sent to all ELNA
members this month.

For information about any of the above (and more), contact:

NEWSLETTER Editor Catherine Schulze, or
ELNA Central Office, Box 1129, El Cerrito, CA 94530, or
ELNA TRAVEL COMMITTEE c/o Horizons Travel Service,
928-A Sir Francis Drake Blvd., Kentfield, CA 94904 - telephone
[415] 459-1313.

SUMMER TIME — LEARN! ENJOY!
Activities for every taste offered —

SWITZERLAND — TARGET COUNTRY FOR 1979
(Group departures from San Francisco, Chicago, New York to
Switzerland)

QUOTE OF THE YEAR

*“Language is the main factor in our superiority over brother animal - and, in
view of its explosive emotive potentials, a constant threat to survival...”*

*“We have communication satellites which can convey a message to the
entire population of the planet, but no lingua franca which would make it
universally understood. It seems odd that, except for a few valiant
Esperantists, neither UNESCO nor any international body has as yet
discovered that the simplest way to promote understanding would be to
promote a language that is understood by all.”*

—Arthur Koestler (*Darkness at Noon, The Gladiators, et al*)
from *JANUS—A Summing Up* (Random House, 1978)

NEWS

NAPA, CALIFORNIA PROGRAM FOR GIFTED CHILDREN

Leo Tolstoy, whose 150th anniversary is being observed this year, said of Esperanto: "The time which each person dedicates to learning Esperanto is so small, and the results so great, one cannot but give it a trial." Redwood Jr. High School, Napa, is giving two classes of its gifted students that opportunity beginning in the New Year. As they have hired Martha Walker, a gifted teacher of Esperanto, we congratulate RJH students on their good fortune.

"She's Delegate to the World (of Esperanto)" is how Kevin Courtney of the *Napa Register* described Martha in a feature article August 29. Result: Martha's latest teaching contract. We hope to honor some of these students at the ELNA Convention in San Francisco next summer when we observe the UN YEAR OF THE CHILD.

Burlingame - Retirement Inn invited Mr. & Mrs. Leen van der Spek of Rotterdam and Bill and Cathy Schulze to a luncheon Nov. 14, where they presented a program of Esperanto music.

San Francisco Community College [Marina Campus] - Beginning and intermediate classes now in their 12th year are being taught by Bill and Cathy Schulze.

Hawaii - Hawaii Esperanto Language Association (HELA), Dr. Reginald Jaderstrom, President, staffed a successful Esperanto booth at the University of Hawaii's Foreign Language Festival in November. Interviewed there on radio and by the *Star Bulletin* were Bunnie Chambers of Wahiawa, Hawaii, and Alberta Casey of La Jolla, CA, who reported that Hawaii reflects more languages per capita than any other state, enjoying a unique position culturally and geographically between East and West.

UTAH:

Brigham Young University, Provo - Dr. Robert W. Blair reports that his students have just completed a mini-course. He considers their communication capabilities, as recorded on video tape after 11 hours of class work, "really extraordinary." Dr. Blair has been invited to teach a half-day workshop at the TESOL Conference at Boston next March.

NOTE: The experimental work of Dr. Blair at BYU and Prof. Sherwood at IU-Champaign mentioned above are positive steps in Esperanto research which the Esperanto Studies Foundation of Washington, DC seeks to encourage.

SANDY, UTAH Nancy Hutcheon, formerly of the Alaska Esperanto Society, seems to be the catalyst for a small group of students and teachers of Esperanto here. We hope to welcome them all at the ELNA Convention in San Francisco next July.

CANADA: - Esperanto history is being made across Canada through the lecture-demonstration tour organized by Wally du Temple, president of the Canadian Esperanto Association with the help of JEN member Wayne Illes and ELNA member Martha Evans. Martha reports that they trekked all the way to the Maritime Provinces and had fine press, TV and radio coverage all along the way, speaking at various clubs, schools and universities.

Buckminster Fuller (So. Illinois University) was a guest of OOMOTO in Japan last summer. His lecture there will be printed in the English section of the *Oomoto Newsletter*.

Chicago - Central YMCA College courses continue under R. Kent Jones of Chicago. Dr. Gertrude Novak administered the AATE examinations on all three levels for students in the Chicago area recently.

Northwestern University, Evanston is offering Esperanto classes under Byron Eguiguren, beginning with the week of January 14.

Chicago - At a well-attended seminar on "Interlinguistics" at the annual meeting of the Modern Language Association held in Chicago, Prof. Bruce A. Sherwood of the University of Illinois was the main speaker.

Prof. Sherwood plugged a computer terminal into the famous PLATO computer-based education system via the telephone network. His display of teaching Esperanto through the PLATO network kept the audience guessing, gaping, and laughing. One major point was that a student could be placed in front of a computer terminal and emerge with a solid knowledge of Esperanto, including excellent phonetics and intonation patterns. He could not learn English as a second language in this manner.

A sample of American midwestern English was recorded and then segmented into units of significant sound known as "phonemes." A terminal with a typewriter keyboard permits the synthesis of these recorded phonemes into intelligible speech. The result? For Esperanto, the operator can punch in regular Esperanto spelling, add some tonal instructions, and the result is lifelike, fluent, entirely human Esperanto - which was not the case with the other five languages demonstrated.

This experiment goes a long way toward proving that national accents are minor and do not hamper intelligibility of Esperanto which is tending toward more - not less - phonetic unity.

(Richard E. Wood)

Pittsfield - The *Berkshire Eagle*, October 19, announced Allan Boschen's new Esperanto classes beginning with his slide presentation at the Unitarian Church entitled "The Value of Esperanto to the Educational Process."

Boy Scout Troop 17 is studying Esperanto with Allan Boschen at St. Francis Rectory.

So. Massachusetts University - Paulo S. De Sousa, who teaches English, French, Spanish, Portuguese and Esperanto, is teaching Esperanto daily at SMU. He reports good progress among the following students: Mary Miller, Dick Nordlund, Yvonne Mendes, Bertram Ketchen, Joe de Sousa, Maria Regina da Silva, John Santos, Christopher Easton, Steven LeBlanc, Elizabeth Willey, Debbie O'Donnell, Maria Ferreira, Mary Almeida, David Arnold, Susan McCall, Janet Jason, and Annalisa Berggren.

NEW YORK: - Mark Starr, Honorary Member of ELNA and a pioneer with a long list of credits in the labor education field, was honored at a testimonial luncheon at the Hotel Roosevelt in New York City October 21st. Starr has been a prolific contributor to the Esperanto press and has authored numerous works on trade unionism including *Labor Looks at Education* and *Labor in America*. He has represented UEA at the United Nations, and for 25 years was Education Director of ILGWU.

TEXAS - Michael Jones continues his speaking activity, most recently with a presentation in the Fort Worth public library at the city center.

ESPERANTO KAJ UN

Festo de la 30-jara Datreveno de la UNIVERSALA DEKLARO PRI HOMRAJTOJ

Katalizita en Islando pasintjare, nia movado ricevis antaŭenpuŝon kiam la ĝenerala direktoro de UNESKO, Amadou Mahtar M'Bou, nomis nin "pioniroj de internacia kunlaboro" kaj nian laboron "nobla tasko"

Konforme al la rekomendo de UNESKO (rekomendo pri edukado por internaciaj komprenigo, kunlaboro kaj paco kaj edukado rilate al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj), la temo de la 63a UK en Varno estis "Internacia lingvo - internacia edukado."



UNIVERSALA DEKLARO PRI HOMRAJTOJ

Artikolo 2

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaro validas same por ĉiuj homoj, sen ia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato...

Artikolo 19

Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado, ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per iu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landolimoj.

Ĉijare Zamenhof-festoj kunligas kun la 30a datreveno de Homrajta Deklaro. En UEA Revuo en oktobro, prez. Humphrey Tonkin rekomendis al lokaj kluboj diskuton de la Deklaro, speciale la du ĉisupre cititaj kiuj rilatas al komunikado. UEA proklamas la semajnon komence 10an decembro kiel Semajnon de Homaj Rajtoj.

Tonkin parolis persone ĉe la UN kun reprezentantoj de la ĉina, hinda, kaj sovetunia delegitaroj, kun la ĉefa kunlaboranto de la vicĝenerala sekretario, kun la estrino de la Traduka Fako, kun anoj de la Interpreta Servo kaj de la Eldona Fako. D-ro Tonkin, profesoro en Universitato de Pennsylvania, renkontis ĉe la UN la vicrektoron de la Universitato de UN (UUN), A. A. Kuapong, kaj la direktorinon de la Novjorka oficejo de UUN. Poste en aŭgusto li vizitis la centran oficejon de UUN en Tokio.

NGOj ĉe UN

Nia nova kunlaboranto en Novjorko, s-ro Probal Daŝgupto aktive partoprenas en la agado de kunularaj NROj (neregistaraj organizoj) ĉe UN. Li cetere verkis raporton pri socilingvistikaj esploroj kiun UEA sendis al la Internacia Komisiono Por Studo Pri Komunikaj Problemoj de UNESKO.

REPREZENTIĜOJ DE UEA

Reprezentis UEA: s-ino Claude Piron en la Monda Konferenco de UN Kontraŭ Rasismo en Genevo; John Wells en konferenco de Internacia Civil-Aviada Organizo kaj en kunveno pri historia origino de rasismo - ambaŭ en Montrealo; s-ro Roland Lindblom kun specialistoj pri komunik-rajto (UNESKO) en Stokholmo; s-ro Leopold Grimme en konferenco de UNESKO pri homrajtoj en Vieno. Niaj kunlaborantoj en Parizo, konstante laboras ĉefe ĉe UNESKO. Krome, UEA reprezentigis en pluraj aliaj konferencoj de UN kaj UNESKO ĉijare.

PROLOGO

(50-jara Jubileo de Internacia Scienca Asocio Esperantista - Poul Thorsen en *Memorlibro pri la Zamenhof-jaro*)

Luktis scienco en ĉiu epoko
kontraŭ ignoro, malhelpo kaj moko.
Sed Galileo kaj Fulton
pruvis, ke eblas privenki la stulton
Al pioniroj
ofte martiroj
sentu hodiaŭ la ŝuldon.

LA POLITIKO EN EUROPO

En Britujo, ĉio estas permesita, se
ne specifice malpermesita.
En Francujo, ĉio estas permesita, eĉ
se specifice malpermesita.
En Germanujo, ĉio estas malpermesita,
se ne specifice permesita.
En Sovetunio ĉio estas malpermesita,
eĉ se specifice permesita.

U.P.R. (Lumo)

LA VOĈO DE L'SILENTO

Aldo de Giorgi (*Hungara Vivo* 3-78)

Aŭskultu,
la silento milnuance sonas,
softe,
tamen perceptebla,
kaj sufloras velurajn emociojn.
Aŭskultu,
ĉu vi ne aŭdas
la melodiojn de sennombraj mondoj,
de mil fantastaj estoj,
de la deziroj,
de la prarevoj,
de la senfinaj viaj vioj?
Aŭskultu
de l'tuta kosmo la mirindan,
misteran susuradon,
de ĉiu herbfadeno,
de ĉiu insektflugo
l'ĉeeston vivinstigan.
Aŭskultu,
aŭskultu la dolĉan flustron de l'silento
kaj vi neniam solos.

KONTAKTO RADIO PEKINO


Letero de Radio-Pekino, 18an oktobro, al d-ro David K. Jordan pro interŝanĝo kun la Esperanto-kursanoj de d-ro Jordan ĉe San Francisco Ŝtat-universitato en somero 1978: "Ni, laborantoj de la Esperanto-Sekcio de Radio Pekino, tre ĝojas ke ni bonorde ricevis la belsonan kaseton kaj belajn lumbildojn senditaj de vi kaj viaj studentoj. Koran dankon. Dankon ankaŭ pro la varmaj vortoj de viaj dekelkaj studentoj. La kaseto kaj lumbildoj helpas nin plibone labori per Esperanto kaj koni vian belan urbon San Francisco. Vi certe akiris grandajn sukcesojn en funkciigo de la kurso kaj viaj studentoj sendube multe progresis en studo de Esperanto. Ni adresas al vi kaj viaj studentoj varman gratulon."

UEA PREZIDANTO HUMPHREY TONKIN MONDVOJAĜAS

En letero al membroj de Societo-Zamenhof post plurlanda vojaĝo, prez. Tonkin kuragige raportas vivsignojn pri la internacia lingvo en landoj kie ĝis nun tiu intereso mankis. Interalie modestaj delegacioj el Sovetunio kaj Romanujo vizitis la UKn en Varna. El Latin-Ameriko ni gajnis kvar novajn landajn asociojn — la peruan, meksikan, venezuelan, kaj duan asocion en Brazilo. Baldaŭ aldoniĝos du pliaj, espereble, el Ĉilio kaj Kolombio.

El Azio ĉijare venis kvar ĉinaj esperantistoj kun specifa mandato komenci interparolojn kun UEA pri formalaj ligoj kaj pri restarigo de efika enlanda Esperanto-movado en Ĉinio.

Tonkin partoprenis la Japanan Esperanto-kongreson en Miŝima en aŭgusto, kiun ĉeestis 350. Li raportas miron pri la granda nombro da eldoniĝoj, kaj pri, Esperanto ankoraŭ ne konataj en Eŭropo. Li trovis en Japanujo pli da idealismo en la plej bona senco celante plibonigon de la homa kondiĉo. Lia impresado estas, ke la japanoj celas vastan popolan bazon anstataŭ agnoskon de altaj instancoj — eble ĉar la japana Esperanto-movado estas escepte bone dotita de grandaj sciencistoj kaj aliaj influaj homoj.



L. L. Zamenhof 1859-1917

La foto montras: oleo-portreton, donaco de la Nederlandaj Esperanto-grupoj; la urnon kun tero de la tombo en Varsovio, donaco de Lidja Zamenhof; la flagon de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer, 1905, donaco de Ges Sergeant.

ABONU AŬ REABONU

La Ĉinan Monatan Gazeton en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

DUM LA SPECIALA VARB-KAMPANJO!

Ĝis la 28a de februaro, 1978, ĉiu nova aŭ renoviga abonanto ricevos senpage grandformatan kalendaron por la jaro 1978, kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj.

Abonprezoj:

por 1 jaro	\$3.00
por 2 jaroj	\$4.50
por 3 jaroj	\$6.00

KLUBOJ! Varbu amase abonojn aŭ reabonojn al *El Popola Ĉinio* inter viaj klubanoj, kaj rekompense ricevu el Ĉinio memoraĵon kun ĉina stilo!

Sendu abonojn al la loka peranto:

ELNA Centra Oficejo
Box 1129
El Cerrito, CA 94530

Generala Distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno kaj Abonvarbilo Senpage Akirebla Laŭpete

ZAMENHOF-FESTOJ okazas tutmonde. Anoncitaj en Usono estas bankedoj en Boston, Los Angeles-San Diego, San Francisco; en Chicago, programo de muziko kaj fest-parolado de Bruce Sherwood, Prof-o de Fiziko, Univ. de Illinois-Champaign.

En "Zamenhof ne estis Monavida" (*Lumo*, Autuno-1978), Adolf Holzhaus citis el diversaj fontoj. Tie ĉi ni citas nur kelkajn: "Lingvo internacia simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn rajtojn personajn je ĝi."


"Ofte diversaj personoj libervole proponadis al mi procentan pagon de siaj verkoj" (li citis Stead, St. Martin, Fried, Ahlberg, de Beaufront, Fruictier) "sed kvankam mi ĉiam estas en tre premita financa situacio, kaj kvankam ili proponadis al mi la monon simple kial ŝuldon de dankeco, postulante de mi nenian laboron kaj nenian publikan aprobadon aŭ respondecon, kaj kvankam mi havis plenan rajton akcepti la proponatan pagon — mi tamen ĉiam rifuzadis." (letero 20-6-1905 al la firmao Hachette)

Ĉe la Universala Kongreso en Barcelono, 1909, D-ro Henri Dor prezentis proponon, ke la kongreso rekomendu D-ron Zamenhof por Nobel premio. Zamenhof dankis al Dor sed petis, ke oni ne enskribu la proponon en la protokolon.

Anatolo Koh en "Miaj rememoroj pri d-ro Zamenhof" rakontas: "D-ro Zamenhof estis la sola varsovia kuracisto, kiu dediĉis unu tagon semajne por senpaga akcepto de malriĉuloj-malsanuloj."

ESPERANTO-TRADUKISTOJ SERĈATAJ

Esperantistoj, kiuj deziras traduki pagate el la angla Esperanten bonvolu respondi al: ELA, Box 17627, Ft. Worth TX 76102. Pago estos laŭ normaj tarifoj, kaj la laboro povas esti traktata tute perpoŝte.



MICĴO MUSO JUBILEAS

Verŝajne taŭgas, ke organizaĵo kiun la ĝenerala publiko taksas "miĉjamusa" aliĝu al la tutmonda aklamado de la furora famo de la "eterna junulo" Miĉjo Muso okaze de la 50-jara datreveno.

Sufiĉe aktualas la kultura revuo *Literatura Foiro* kiu invitis D-ron David Jordan (antropologia fako, Universitato de California - San Diego) verki artikolon "La Unuaj Kvindek Jaroj de Miĉjo Muso - Vido el Usono" kiu aperis en *Literatura Foiro* okt. 1978, n-ro 51. Esperantistoj en la Cseh-kursoj jam antaŭ multaj jaroj, en libreto n-ro 8 de *Konversacia Literatura*, konatiĝis kun la petolema muso.

Kontraste al Pajo (Donald Duck), Miĉjo estas la prototipa malfripono; laŭ Jordan, li estas "konstanta, nobla, simpla, laboregema, malfanfara, nepretendema. La mondo klopodas prifriponi Miĉjon kaj Miĉjo per konstantaj honesteco, laboro, nobleco venkas ĉiujn obstaklojn..."

"Pajo kontraŭ la mondo signifas nian malnoblecon; la mondo kontraŭ Miĉjo signifas nian noblecon", skribas D-ro Jordan. Sume, io en la personeco de la simpatia muso elvokas liniojn de Zamenhof el la poemo "Pluvo":

**Ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas
Al la freŝo la koro min tiras.**

...La redaktoro



SCIENCAJ STUDOJ APEROS

Prof-o d-ro Richard E. Wood estos gast-redaktoro en 1979 de *WORD*, organo de International Linguistics Association (ILA, New York). La unua numero entenas artikolon de Wood mem, sub la titolo "Ne-teritoria, ne-etna lingva komunumo". Temas pri socilingvistika pritakso de la fenomeno de la ekzisto de la uzantaro de Esperanto, dise en la mondo, kun ampleksa bibliografio.

La aŭtoro dediĉas apartan atenton al kompara analizo de la kialoj de la lernado de Esperanto respektive de naciaj lingvoj; al la samtempa ekzisto de lernintoj de la lingvo kaj de denaskaj parolantoj, de movadanoj, kiuj nebone aŭ tute ne posedas la lingvon, kaj de personoj, kiuj bone, eĉ denaske, parolas la lingvon, sed ne apartenas al la movado; kaj al nunaj direktoj en la evoluo de la socilingvistika komunumo de uzantoj de Esperanto. La numero portos la ĝeneralan titolon "Socilingvistikaj studoj pri lingvo-kontakto". Krom Wood, kun-gastredaktoroj estas prof-oj d-roj William F. Mackey (Internacia Centro por Studo de Dulingveco, Universitato Laval, Kanado) kaj Jacob Ornstein (Universitato de Texas, El Paso, emerita), longjara simpatianto de Esperanto, kies popularsciencaj verkoj pri lingvistiko kaj lingvoj, kun simpatiaj aludoj al Esperanto, certasence donas al li rolon de sekvanto de la lastatempaj forpasinta popularscienca lingvistika verkisto, prof-o Mario Pei.

Krome eldonota en 1979 estas la dua, ankaŭ duobla, numero sub la titolo "Lingvo-planado kaj lingvo-traktado: tutmondaĵ kaj studoj". Tiu, same anglalingva, kajero entenas proks. 30 studojn pri la lingvo-planado kaj lingva politiko en tiom da landoj, regionoj aŭ lingvaj teritorioj. Inter ili troviĝas anglalingva studo de Jouko Lindstedt, studento pri la lingvistiko ĉe la Universitato Helsinki, Finnlando, "Planado de planlingvo. La konstantaĵoj kaj variaĵoj de Esperanto".

Enketojn de unuopuloj aŭ bibliotekoj pri aĉeto de la kajeroj oni sendu (angle, france, hispane, aŭ germane) al la Sekretario-kasistino, International Linguistic Association, S-ino Catherine Davidovitch, 73 Point Beach Drive, Milford, CT 06460, Usono.

DECEMBRO ESTAS MONATO DE LA ESPERANTA LIBRO

DONACU LIBRE!!

SEMAJNO

Announcing the subscription campaign

for this new, high-quality, weekly, 40-page

Esperanto magazine of current events and commentary.

A discounted price of \$66 will apply to those

who subscribe before January 15, 1978. Regular price is \$75.

You need not pay until after you receive your first copy.

Send \$1.50 for the specimen copy now available.

This is a unique initiative in Esperanto publishing

and deserves the support of all Esperantists.

SEND YOUR ORDER TODAY TO:

ESPERANTO LANGUAGE SERVICE COMPANY
452 Aldine, Apt. 501, Chicago, IL 60657

VOLAS KORESPONDI

Goar Engeländer, Thomasweg 3, D-4796 Salzkotten, W. Germany
Bőgne Zsuzsa, Debrecen, Blahóve 13, 4024 Hungary - studentino
Simeon Dimon, 1300 Kubrat, Stambolijski 5, Bulgaria - intersanĝas Esperantaĵojn
Nedko Nikolov Ĥristov, Danjo Pačov No. 12, 8900 Stara Zagora, Bulgaria - 18jara junulo interesiĝas pri elektrotekniko kaj sporto.
Irenevsz Lewicki, 88-320 Strzelno, ul. Inowroctawska 6 m.9, Poland - instruisto en mezgrada lernejo.
Hans Joachim Krieg, Kloster-str. 11, DDR-49, Zeitz, E. Germany

BONA ESPERO VIZITITA

Usona Esperantisto, vizitante Brasilia-n survoje al la Latin-Amerika Kongreso en Marilja, mi kontaktis delegiton kaj ricevis inviton viziti ĉe Bona Espero.

La fakdelegito faris kelkajn telefonvokojn. Ankaŭ per radio-amatora stacio, helpata de samideano en Bruselo, Belgujo, li alvokis la bienon Bona Espero por ricevi last-minutan mendetojn pri bezonitaj aferoj, ekzemple najloj kaj ŝoveliloj.

Frumatene aperis ĉe hotelpordego la direktorino de la bieno, portante longan liston. Ni vizitis vendejon de konstrumaterialoj. Tie, du kaminoj pleniĝis de cemento, fero, pordoj, fenestroj, sakoj da najloj kaj du ŝoveliloj. La aŭtomobilon oni plenigis per mangajoj, precipe rizo kaj brasiko.

La karavano veturis laŭ polva, ne asfaltita 240-kilometra vojo norden, ĝis Alta Paradizo - malgranda, malnova, malbela urbeto. Se tia estas Alta Paradizo, kia estas la normala paradizo? Aŭ la malalta?

La aŭto turnas maldekstren, nun ĝi veturis mallargan truoplenan, ŝtonan vojon. Poste pordegon, riverojn, lignajn pontojn, finfine blankajn konstruaĵojn, hundojn, bovinojn, infanojn.

Ĉe longa tablo lumigita de enboteligita gaso ĉiuj kune manĝis; 20 diversaj infanoj, la paro Grattapaglia, 4 volontuloj el Germanujo, Nederlando kaj Usono; 2 kamion-ŝoforoj; 1 emerita instruistino alvokita por helpi instrui portugalan gramatikon; la vizitanto, kaj maljuna sinjoro, bonulo, unu el la fondintoj de Bona Espero. Sur muro pendas tolo teksita montrante "La Lastan Vespermanĝon" laŭ Leonardo da Vinci.

Ekstere, sudaj steloj forte brilas en nigra ĉielo. Matene, diverskoloraj infanoj faradas taskojn, melkas bovinon, manĝigas kokinojn, akvumas legombedon. Post matenmanĝo, ĉiuj helpis malŝarĝi kamionojn. Lernejo ne funkcias ĉar estas festa okazo kiam venas kamionoj.

Posttagmeze, juna germana volontulino faras brikojn por la nova lernejo. Honda maŝino ekfunkcias por fari elektron por vibradi brikojn. La nova lernejo bezonas 1500 brikojn. Ĉiun tagon fariĝas 50 brikoj. Baldaŭ la lernejo!

La vizitanto promenadas laŭ vojetoj en 1380-hektara bieno, vizitas akvofalon, homfaritan lagon, studas akve movitan pumpilon, grimpas monton por rigardi buston de Zamenhof, rigardas herboplenan flughavenon, konstruigitan de Brazila prezidento antaŭ 20 jaroj kiam li serĉis lokon por Brasilia. Nun la flughaveno apartenas al Bona Espero. Ĉevaloj mangas tie. Insektoj pikas.

Bona Espero estas sonĝo, revo. Sed primitive ĝi funkcias. Tie sengepatraj infanoj lernas dulingve, ricevas gvidon, manĝon, amon. Tie estas imitinda servo, helpata de Esperantistaj bonuloj el tuta mondo.

Por ke kresku Bona Espero, bezonataj estas laboremaj, amemaj, volontuloj kiuj deziras resti kaj labori por helpi la komunumon kaj la infanojn.

Ĉu Esperantista Kibuco?

VIRINOJ EN USONO

[Tiu ĉi historian perspektivon de virinoj en edukado kaj publika vivo en Usono petis Esperantista Virina grupo por volumo kiu spegulos virinan edukadon tutmonde. Pro la grandeco de Usono mi faris nur skizon de vere ampleksa temo. — Cathy Ŝulze, UEA-FD por virinaj aferoj, San Francisco, CA]

La progreso de virinoj en Usono komenciĝis kun edukado. Sed ili efektive progresis en komerco, edukado, kaj la profesioj (juro, medicino, ktp) nur post ili en 1920 ricevis plenan politikan rajton per voĉdonrajto.

La Ligo de Virinaj Voĉdonantoj estas altefika, prestiĝa organizo kiu antaŭ la prezidentaj elektoj organizas naciajn televidajn debatojn inter la ĉefaj kandidatoj kiujn milionoj spektas. Tiu ligo pristudas leĝprojektojn kaj faras rekomendojn kiujn la publiko serioze atentis.

Malfacile estas elekti unu virinon kiu elstaras. Unu el la plej konataj en Usono estas Susan B. Anthony, kiu gvidis la kampanjon por virina voĉdonrajto. En libro *Angeloj kaj Amazonoj* oni menciis ŝin (kiel unu el la Amazonoj, verŝajne). Clara Barton, kiu batalis por starigo de la Ruga Kruco en Usono, estis unu el la Angeloj. Sed Elizabeth Cady Stanton estis la ĉefa arkitekto de virinaj rajtoj en Usono. Ŝi aperas en paĝo post paĝo de la historio kiel giganto en la Usona virina movado.

Tra la 19a kaj nuna jarcentoj virinoj strebis por la rajtoj de laboristoj, por forigo de laborekspluato de virinoj kaj infanoj, kontraŭ alkoholismo, kaj por la rajtoj de Negroj kaj aliaj minoritatoj. Sed estis la pionira agado de virinoj por pli bona edukado de ĉiuj kiu kondukis al ne nur la rajtoj de virinoj sed de ĉiuj. La listo de atingoj ege longas.

Usono komenciĝis en la 17a jarcento kiel brita kolonio kaj adoptis anglan edukistemon. Frue en la 19a jarcento rapide multiĝis duagradaj lernejoj por virinoj kie ili studis matematikon, sciencon, historion, filozofion, literaturon, muzikon kaj arton. Por ŝpari monon oni komencis instrui virinojn kun la viroj.

Oberlin (Ohio) Kolegio en 1837 estis la unua kiu akceptis ne nur virinojn sed ankaŭ Negrojn. Post Oberlin, la nombro de duseksaj kolegioj rapide kreskis. En 1841 kvar virinoj ricevis diplomojn. Jam antaŭ tiu dato virinoj diplomiĝis el pluraj virinaj kolegioj.

En Usono la ĉefa instigo al edukado por ĉiuj estis la akceptita kredo ke demokrata socio povas sukcesi nur inter edukita publiko, kaj ankaŭ la kredo ke, se oni edukas viron, rezultas edukita viro, sed se oni edukas virinon, tuta familio edukiĝos. Jam inter jaroj 1830-1850 aperis 64 gazetoj por virinoj. Ofte tiuj revuoj pledis por pli bona eduko por virinoj kaj poste por la voĉdonrajto. Eĉ invento de la gaslampo kontribuis al edukado ĉar homoj povis legi vespere. Virinoj en fabrikoj starigis literaturajn klubojn.

"La Unua Virino" kiu ricevis diversajn licenciojn:

Doktorala diplomo: Helen Magill ĉe Boston (Mass.) Universitato, 1877, per disertacio pri Greka Dramo; Ŝi instruis en diversaj kolegioj. Ŝi kontraŭstaris voĉdonrajton por virinoj.

La unua kuracistino: Elizabeth Blackwell, diplomiĝis el Geneva Kolegio (Beaver Falls, Pa.), en 1849.

La unua religia pastorino: Antionette Brown, diplomiĝis ĉe Oberlin (Ohio) Teologia Kolegio en 1850; ordiniĝis en 1853.

La unua advokatino: Arabella Mansfield, licenciĝis en 1869.

En granda nacia debato meze de la 19a jarcento neeviteble oni komparis la staton de virinoj kun tiu de sklavoj. Ĉe Monda Konferenco Kontraŭ Sklaveco en 1840, oni ne permesis virinojn. Kolerege ili demandis: "Ĉu oni konsideras homajn rajtojn nur virajn rajtojn?"

BIBLIOGRAFIO:

Biography of American Women

Encyclopedia of Education, vol. 9 - Macmillan Co.

Angels and Amazons - Inez Haynes Irwin - Doubleday, Doran & Co.

Enterprising Women - Caroline Bird - W. W. Norton & Co.

Century of Struggle - Eleanor Flexner - Belknap Press of Harvard University Press

—Robert B. Holland, Sao Paulo, Brazil

IS THE LOCAL ESPERANTO GROUP OUTMODED?

The Current Crisis

During the past few years there have been frequent discussions in the Esperanto press about the function and future of the local Esperanto group. What sort of relationship does it have to the national and international Esperanto organizations? Have times so changed that small clubs are now obsolete?

Recently the London Esperanto Club celebrated its 75th anniversary. What factors are responsible for such longevity? Good leadership is essential to provide purposeful direction for the activities of the club and to avoid divisive conflicts. An active membership is necessary for successfully implementing the group's program. Collaboration with the national Esperanto organization is required in order to avoid duplication of efforts and to enable the coordination of programs.

Functions of the Local Group

In order to judge whether a local organization is fulfilling its basic functions, these have to be clearly stated. They are threefold: information, teaching, and the practical application of Esperanto. By means of information campaigns the public is made aware of the seriousness of the world language problem and the existence of a solution in the form of the international language Esperanto. The local organization must give individual Esperantists the feeling they are part of a living speech community, expressing itself in the international language and striving to solve the worldwide communication problem across linguistic barriers. What then are some of the factors preventing maximum fulfillment of the aims of the local group?

Leadership which doesn't lead

In every social group there exist complex reciprocal relations between leaders and members. The former may be authoritative or democratic, and in their own way both types are capable of achieving results. Another type of leader is the do-nothing individual. Perhaps he owes his existence to the fact that he has no competition for the presidency. Or it may be that he had held the office for so many decades that others are reluctant to take his place for sentimental reasons. This type of leader can be more dangerous than the dictatorial one, mainly because he accepts with complacency the passivity of the membership which in turn becomes accustomed to the do-nothing and tolerates his inactivity. This situation is doubtlessly one of the main reasons for loss of serious active members. [Ed. note: It is just this situation upon which "La Komitato Devias" in Rob MacKay's "15 Komedietoj" is based.]

Inadequate Teaching

No one has ever learned the language in a few hours, days, or weeks despite the boasts of overzealous propagandists. As soon

as it becomes apparent that a certain amount of mental exertion is required, some beginners quickly lose heart and desert the course. It is therefore essential to avoid the impression that Esperanto can be learned without effort.

Probably the principal cause of failure of courses is the low level of the teaching. Often the task is undertaken by a person impelled by missionary fervor who insists on teaching Esperanto despite lack of competence. Clubs frequently assign such a person to teach elementary courses and reserve a better teacher for the advanced level of instruction. But the elementary course is the most important of all so that the teaching assignments should be reversed. Dropouts don't return to waste their time again and they are lost to the movement. There is one exception - the eternal beginner. A special circle should be set up for the eternal beginners - a sort of course for slow learners.

Course planning

Every professional language teacher is aware of the necessity of preparing lesson plans and arranging course material so that from the first lesson the student acquires useful knowledge and progresses rapidly. Division of the material to be learned must be made on the basis of the nature of course members - age, education, motivation, etc. If a competent teacher is not available it is better not to offer the course.

[Ed. note: In the U.S., ELNA and AATE cooperate in providing a very good correspondence course and national examinations.]

Recruitment

One aim of teaching Esperanto is to prepare for participation in the movement. It is not enough to teach only the language but also something of its history and literature. The local club should be an extension of the classroom and new Esperanto speakers should be encouraged to make contact with Esperantists abroad through correspondence and travel.

The Green Curtain

Avoid fossilization by drawing aside the Green Curtain which separates the Esperanto movement from society at large. Instead of waiting for the public to come to Esperanto, it is necessary to take Esperanto to those in need of it. Local clubs should cooperate with widely known organizations whose principles and aims coincide with those of the Esperanto movement - such organizations as the United Nations Association, UNESCO, UNICEF, service clubs, Scouts, environmental groups and the like.

To sum up, it is clear that the local Esperanto group is important since it fulfills key functions which organizations on other levels are unable to do. These are: to give Esperantists an opportunity to meet and speak the language, thus creating the basis for an international speech community; to provide hospitality for foreign visitors; to teach the language; and to inform the general public. These tasks are important. How many local groups do them well?

Bernard Golden

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA BOX 1129, El Cerrito CA 94530

Enclosed is \$ _____ for ____ new ____ renewal membership in ELNA for the year 1979.

NAME _____

Name and address of each new member published in ELNA Newsletter and next edition of ELNA-Adresaro unless member indicates otherwise.

ADDRESS _____

CITY _____ STATE _____ ZIP _____

Check correct category: Regular (\$15) Family (\$22.50) Youth (18 or under) (\$7.50)
 Student* (full-time, 25 or under) (\$7.50) Senior (renewal only, 65 or over) (\$7.50)
 Life (\$300)

DATE OF BIRTH (if applying for Youth, Student or Senior rate) _____

OPTIONAL INFORMATION

Telephone number: Area code (_____) _____

OK to publish phone and/or call letters in ELNA-Adresaro?

Radio call letters (if applicable): _____

Yes No

1979 SUMMER TRAVEL IN BRIEF

Janet Brugos Young, Tour Guide

If group departures July 18 or 26 do not suit your schedule, other dates can be arranged if requested early. To take advantage of an Iberian post-convention tour, there are group departures from San Francisco, Chicago and New York using the *advantage of a tour basing fare* to include planned stops in Barcelona, Madrid and Lisbon after the full week at the Esperanto convention in Lucerne, Switzerland. (See details below.)

IMPORTANT: You can request your lodging for the UK in Lucerne through ELNA TRAVEL COMMITTEE at Horizons Travel Service. Hotel space in Lucerne is extremely limited. First come, first served is the rule — so let's all be first.

PRECONVENTION TOUR July 19-27 takes us by bus from the airport in Zurich to Locarno. Daily excursions take us through a pictorial wonderland through the German, French, and Italian regions of Switzerland, sampling modern and 19th century hotels — all with private baths and continental breakfast.

TOUR BUS TAKES US TO LUCERNE for the **ESPERANTO CONVENTION** [July 28 - August 4].

POST-CONVENTION TOUR August 5-12

Barcelona and surrounding villages offer flamenco dance and crafts in a natural setting; a stop in Madrid to visit the Prado Museum, then on to Portugal where one excursion will take us to Estoril on the Costa del Sol. The trip is planned so that we may "savor the flavor" of each region.

NOTE: Space does not permit detailing the super travel plans painstakingly arranged by Janet Brugos Young of the ELNA TRAVEL COMMITTEE and Horizons Travel Service. For more information contact Janet directly.

IF YOU MOVE...PLEASE

NOTIFY US IMMEDIATELY OF YOUR NEW ADDRESS. It costs your League an average of 50 cents when you do not notify us of your change of address. A 10-cent postcard from you will save not only the money but considerable time and frustration in the Central Office. Our heartfelt thanks to those thoughtful members who notified us of their changes.

Esperanto League for North America

P.O. Box 1129
El Cerrito, CA 94530
Usono/USA



NEWS - PLEASE EXPEDITE

POTPOURRI

USONA OR USA? There was a small movement in colonial days in name this country USONA, an abbreviation for United States of North America, making the citizens "Usonians." Other proposals were "Columbia" and "Fredonia." It took another century for Esperanto to adopt "Usono" as the name.

Fellowship, the organ of Fellowship of Reconciliation, Oct., 1978, carried a letter by F. H. Sumner, Corvallis, Oregon in which he quotes an article in the May, 1978 *Komuna Esperanto-Gazeto*, organ of the Federation of Esperanto Organizations in the Netherlands (translated): "Language chaos is the best ally of the war industry. Esperanto is the best ally of peace-loving peoples, because it helps decrease the influence of narrow-minded thinking." As an example of the latter, "...the French minister of Education before World War I forbade the teaching of Esperanto and strongly opposed the recommendation of Esperanto by the League of Nations because the study of that language would menace the patriotic education of the children..." Sumner feels that "...an honest search for world peace must include an easy-to-learn, neutral (second) language such as Esperanto."

Oregon State University (Corvallis) listed the itinerary for this year's European Tour by its 50-member choir in a 7-language brochure including Esperanto due to the initiative of one of its members, Martha Deer of Portland.

Science Notes: *Israeli Esperanto Review* (July, 1978) features a concise report by H. Mashler on two successful water projects. sweet water produced by desalinization and heavy water for atomic reactors.

NO, VIRGINIA, THEY DON'T ALL SPEAK ENGLISH Dept.

Hard on the heels of the report of dropping English as the language of official speeches of welcome to foreign guests in Pakistan comes the demotion of English in Africa's largest county by population, Nigeria. In September, 1978, General Obasanjo, Nigeria's Head of State, announced in Lagos that English would be replaced in the parliament by three leading Nigerian languages, Hausa, Igbo, and Yoruba.

(Dr. Richard E. Wood)

Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE
PAID
Berkeley, CA
Permit No. 330